

Esperanta Librotrezoro

No 2.

Akordoj Esperantaj

— de —

M. L. Kaplan.

1922.

Eldonejo: J. Ŝapiro, Lipowa 33. Białystok, Polujo.

En Polujo

donas ĉiujn informojn
pri la Esperanta mo-
vado, havigas espe-
rantajn librojn, gaze-
tojn k. t. p.:

POLA Esperanto Servo

(Gvid. Fr. Prengel),
Kordeckiego 1-a, Byd-
goszcz kaj

Pola Esperanto Informejo

(Gvid. B. Strelczyk
kaj E. Henkel) ul. 3-go
Maja 10, Turek.

U. E. A.

Via devo estas

aliĝi al la

Universala Esperanto Asocio

(12, Boulevard du Théâtre,
Genève)

B. E. S.-a Adresaro de Esperantistoj

el ĉiuj landoj

estas bazona helpilo por ĉiu esperantisto!

Bohema Esperanto Servo Moravany

Bohemujo

Reprezentanto por Polujo:

J. Ŝapiro, Bialystok, Lipowa 33.

M. L. Kaplan

**AKORDOJ
ESPERANTAJ**

1922.

547362

Ĉiuj rajtoj
rezervitaj



821.922-1

Presis
Presejo „Viktoria“
en Białystok
Lipova 21.

*Mi dedikas
tiun-ci verkon al
mia kara kaj amata
filineto Rozo.*

La aŭtoro.



Mia kanto.

Mi ne kantas pri printempo,
Mi ne kantas pri la suno,
Mi nur kantas pri la nokto,
Mi nur kantas pri aŭtuno.

Apud tomboj freŝaj estis
Mian kanton mi kantinta,
La aŭtuna forta vento
Sola estis min helpinta . . .

El mizeroj, el ĉagrenoj
Estas mia kant' ŝpinita,
En maldolĉaj larmoj miaj
Estas ĝi malsekigita . . .

Ne por vivo, ne por ĝojo,
Mi nur kantas por doloro;
Mi nur kantas pri la morto,
Mi nur kantas pri la ploro . . .

Floro mia !

Floro mia bela! Tiu sama fin'
Atendanta vin, atendas aukaŭ min:
Kiel vi mi estos sekiginta,
Kiel vi mi estos forvelkinta . . .

Floro! Ambaŭ nin atendas ja la mort',
Sed pli bona tamen estas via sort':
Vi almenaŭ floris, vivis iam,
Mi ankoraŭ floris ja neniam . . .



Ne envidu !

Ne envidu mian ĝojan kaj brilantan vivon,
Frato malfeliĉa kaj amiko-suferanto!
Kredu min: ĝi estas falsa, ĝi ne estas vera,
Ne, ne ĉio, kio brilas, estas diamanto . . .


Kaj simila estas la brilanta vivo mia
Al farita arte bela nenatura floro:
^
Ĝi de malproksime vin mirigas kaj ravegas,
^
Sajnas ĝi al vi vivecplena, bonodora.

Sed se vi al ĝi alproksimiĝas nur malmulte,
Tuj senvualiĝas antaŭ vi la tuta vero:
^
Ĝi sensignifaĵo estas, morta kaj senviva,
Kaj neniam estis ĝi kreskaĵo de la tero . . .

Frato mia! Pli proksimen nur al mi aliru,
^
Ĝemojn vi ekaŭdos, ĝemojn ĉiun ja minuton;
Vi ekscios tiam, ke ankoraŭ mi neniam
Sciis de la vera efektiva ĝoj' eĉ guton...

Ne rigardu la rideton sur la lipoj miaj:
En okulojn miajn ekrigardu kun atento;
Tie trovos kaj ekvidos vi kaŝitajn larmojn
Ne de ĝojo, larmojn de sufero kaj turmento..
Tio sama estas ankaŭ en ĉielo ofte:
Brilas kaj ridetas ja sur ĝi la suno hela,
La naturo tuta ja festegas kaj triumfas
Tamen ploras kun maldolĉaj larmoj la ĉielo...

— — — — —
Ne envidu mian ĝojan kaj brilantan vivon,
Ne allogu ĝi vin, mia frato malfeliĉa!
Mia vivo estas ja monujo tre belega,
Monujo bela, sed... malplena, kaj malriĉa...



Songo.


En songo mi vidis: subite
Por ĉiam la sun' estingiĝis,
Kaj tuj en la mondo mallume,
Mallume kaj nigre fariĝis . . .
Kaj laŭte ploregis la homoj,
Kaj tremis de ploro la tero:
Ho ve al ni, estas mallume!
Ho helpu nin Di' en mizero!
Kaj aukaŭ la tuta naturo
Plorĝemis kaj petis ĝi Dion:
Ho Di'! reŝlamigu la sunon,
Car vidi mi povas nenion! . . .

Sed mi nur silentis, ne preĝis,
Mi sola ne estis ploranta,
Car ankaŭ pli frue egale
Por mi ĝi ne estis brilanta . . .

Vintro.

Vintro en strato kaj vintro en koro,
Vintro malvarma, malgaja!
Mortis delonge la lasta jam floro,
Pasis la tempo, la maja . . .

Vintro de l' strato rapide forestos,
Baldaŭ printempo revenos;
Vintro de l' koro - ĝi sola nur restos,
Longe ĝi tie promenos . . .



Du Violonoj.

I.

Mi konis iam unu violonon,
Al iu ĝi blindulo apartenis;
Mi ofte ĝin renkontis en la strato,
Vidadis ĝin mi, kiam mi promenis.
Malsata en la statoj de la urbo
Kun ĝi vagadis li kaj tute tremis;
Li kantis pri mizera sia vivo,
Kaj ĝi kortuŝe ludis kaj plorĝemis . . .
El urb' en urbon li kun ĝi migradis,
Nek hejmon konis li, nek familion;
Li estis fremda en la tuta mondo,
Kaj havis li nenium kaj nenion . . .
La tutan doloregon de l' animo
Enmetis li en sian violonon;
Kaj ludis ĝi malĝoje kaj ĉagrene,
Kaj sciis ĝi neniam gajan sonon . . .
Kaj longe ludis ĝi sed.. fine krevis...
Kaj nun ĝi estas disrompita tute;
Kun kordoj disŝiritaj, diskrevintaj
Ĝi kuŝas nun senmove jam kaj mute . . .

II.

Mi konis iam unu violonon,
Al iu ĝi riĉulo apartenis;
Mi konis ĝin, tre bone ĝin mi konis,
En miaj manoj ofte mi ĝin tenis.
Kaj forte amis sian violonon
Kaj flegis ĝin kaj gardis la riĉulo,
Li ŝatis ĝin senfine, senmezure,
Pli bone ol pupilon de l' okulo . . .
En sia hejmo en palaco granda
Post dormo dolĉa aŭ post manĝo sata,
Ludadis li diversajn melodiojn
Je violono kara kaj amata . . .
Kaj laŭ la sonoj de l' akordoj gajaj
Dancadis lia tuta domanaro:
Monato tiel flugis post monato,
Kaj jaro tiel kuris post la jaro . . .
Kaj longe ludis ĝi, sed... fine krevis...
Kaj nun ĝi estas disrompita tute; }
Kun kordoj disŝiritaj, diskrevintaj
^
Gi kuŝos nun senmove jam kaj mute . . .

Liro.

Mi havis en la koro liron,
^
Gi vekis nur en mi sopiron,
Kaj sopiradis mi konstante
Je kio mem ne komprenante . . .
Kaj multe mia kor' bruegis,
Kaj forte, forte doloregis . . .
Kaj nun jam krevis mia liro,
Aukoraŭ tamen la sopiro
Kaj la bruego, la doloro
De mia lacigita koro
Ne malaperas, ne foriras-
Mi je la liro nun sopiras . . .



Du Floroj.

Fanfaronis unufoje ia floro
Kaj fiere ĝi al alia diris:
„Frato! apud mi ankoraŭ vi ne estis,
Kiam el la tero mi eliris . . .
Mi unua floro estas de printempo.
Frue Dian mondon mi ekvidis;
Tiam vi ankoraŭ tie-ĉi ne estis,
En la tero vi profunde sidis . . .
Multon vidis mi kaj aŭdis dum la tempo,
Kiun sur la tero mi min trovas;
Multon scias mi kaj multon mi komprenas,
Vi kun mi kompari vin ne povas“ . . .
Kaj respondis tuj al ĝi la dua floro:
„Ho, ne ĝoju, mia frat' maljuna
Kaj ne ĝoju, ĉar por vi pli frue ankaŭ
Venos malgajiga temp' aŭtuna . . .
Mi ankoraŭ estas freŝa kaj juneta,
Kaj ankoraŭ vivos mi someron,
Sed por vi la vivo baldaŭ ja finiĝos,
Kaj vi iros reen en la teron“ . . .

En luna nokto.

Mi al vi rakontos, luno,
Kial mi rigardas vin,
Kial via pala lumo
Tiel sorĉe loĝas min?
Kaj al vi mi nur malkovros
Mian korsekretan, lun',
Kiu min ne lasas dormi,
Ankaŭ ne maldormi nun . . .
^
Sajnas nun al mi, ke ie
Mia kara amatin'
Aukaŭ staras, vin rigardas,
Kiel mi rigardas vin . . .
^
Sin je mia nom' salutis,
Mi vin petas, pala lun'
^
Si pri mi ja certe pensas
Kaj pri mi ŝi revas nun . . .

Mia Amatino.

Kian belan kaj belegan

Mi posedas amatinon!

En la tuta mond' ne trovos

Tian ĉarman vi fraŭlinon . . .

Vangoj pomaj, lipoj rozaj

Kaj okuloj-diamantoj;

Dentoj blankaj, neĝkoloraj,

Haroj nigraj kaj brilantaj . . .

Sed nur kiam vi ekscius,

Kian koron ŝi posedas,

Tiam vi al mi—mi kredas

Tiel forte ne envidus . . .



Al . . .

Mi amis vin per amo senmezura,
Per amo senmezura kaj senlima,
Mi amis vin per vera amo pura,
Per amo vera, kora kaj anima . . .

Mi amis vin, mi amis kaj adoris,
Kaj ĉion, ĉion mi al vi konfidis,
Sed vi-ho ve al mi-vi ridis dum mi ploris,
Kaj senkompate vi nur min perfidis . . .

Mi amis vin . . . sed kion do mi diras:
Ĉu nun jam vin ne amas mia koro?
Ĉu nun al vi mi forte ne sopiras?
Ĉu mortis vi en mia jam memoro?

Rigardu: Kiel sklavo kondamnita,
Timeme atendanta sian sorton,
Jen staras mi kun kapo mallevita
Kaj petas vian amnestian vorton . . .

Ne punu do min tiel malfacile,
Ne estu tiel vi al mi severa!

Vin petas kaj petegas plej humile
Amiko via, vera kaj sincera . . .

* *
*

(Al D-ro Bielenki).

Sinjoro Doktoro!

[^]
Ce mi en la koro

Neniam, neniam Vi mortos;

Mi ĉiam la bildon,

La Vian, la mildan,

Kun ĝoj' en animo kunportos . . .

Sinjoro Doktoro!


En mia memoro

Eterne Vi vivos kaj floros;

Forgesos neniam

Mi Vin kaj por ĉiam

Memoros kaj multe adoros . . .



La Verda Standardo.

Fraŭloj kaj fraŭlinoj,

Patroj kaj infanoj!

Tenu la standardon

Verdan en la manoj!

Levu ĝin kaj portu,

Portu ĝin plej alte;

Vigle kaj kuraĝe

Paŝu vi senhalte!

Kolektiĝu ĉiuj

Sub la Verda Stelo

Kaj autauen marŝu

Al la sankta celo!

Jru kaj ne timu,

Jru do kun ĝojo,

Pli kaj pli antauen

Sur la longa vojo!

Estas ĝi ŝtonplena,
Dorna kaj sensuna;
Sed ni ĉion venkos
Per labor' komuna!

Ni laboru kune
Vere kaj fidele;
Nia verda stelo
Nin lumigos hele,

Fratoj kaj fratinoj,
Gesamideanoj!
La Standardon Verdan
Tenu en la manoj!

Amo kaj frateco
Regos sub ĉielo,
Se vi unuiĝos
Sub la Verda Stelo . . .



La Sango de Profeto.

(Laŭ Talmuda legendo)

De malamiko ĉiuflanke ĉirkaŭita,
Jeruzalem' kun lastaj fortoj nun batalas;
Kun glav' sangruĝa en la mano konsumita
Heroo post heroo morte teren falas . . .

Kaj sole regas nur en urbo la malsato,
Kaj fortoj ĉiujn jam forlasas kaj forĵetas;
Kaj vane ĉiu serĉas panon en la strato,
Kaj morton plej rapidan vokas li kaj petas..

Malplenaj kaj dezertaj staras ĉiuj domoj,
De la loĝantoj ili estas forlasitaj;
La sankta Templo plena estas nur de homoj
Kun palaj lipoj kaj rigardoj timigitaj . . .

En mezo de la Templo apud la altaro,
Sur la marmora planko homa sango bolas;
Gi muĝas kiel ondoj de la vasta maro,
Kaj trankviliĝi, kvietiĝi ĝi ne volas . . .

Per akvo pura ĝin forlavi oni provis,
Sed ĝi kun pli grandega forto reaperis;
Malaperigi ĝin neniel oni povis,
Forigi ĝin de l' planko oni ne prosperis...

Pli forte, pli sovaĝe nova sang' elfluis
El sub la planko, el profundo de la tero,
Ĝi sennature ekbolegis kaj ekbruis,
Flamanta kaj bruliga iĝis ĝi infero . . .

Mortpala kun vizaĝo tute larmiĝinta,
Timeme, pie ĉiu preĝon murmuretas:
„Ho Dio granda, ĉiopova, ho Kreinto!
Ne pereigu nin, ni petas Vin kaj petas...

Ho ve al ni, ho ve, ni tiel multe pekis!
Ni kolerigis Vin per nia krima ago:
Profeton Vian, kiu vokis nin kaj vekis
Al ver', al am', mortigis ni je hela tago...

Kompatu nin! Ni petas nun de Vi pardonon,
Vi estas pardonema ja kaj tiel bona!
Ne pereigu, ne detruu Vi Cionon,
Kaj restu Via nom' en Templo Salomona!...“

— — — — —
— — — — —

Disfandis sin, forfalis la fortika muro,
Ne povis kontraŭstari plu la garnizono;
Kaj, sin savante, ĉiu kuras en teruro
Al sankta Templo de la reĝo Solomono...

Triumfe en venkitan urbon enirinte,
La malamik' detruis ĉion kaj disbatis;
De venko granda kaj de sang' malsobriĝinte,
Li eĉ senkulpajn mamsuĉulojn ne kompatis...

Kaj jen Nebuzaradon*) kun armeo sia
Al sankta Templo gaje marŝas kaj rapidas;
Kun kor' ĝojanta kaj vizaĝo plej radia
De malproksime li jam murojn ĝiajn vidas...

Kaj forte, forte li ekŝtormis kaj ekbruis
Kaj al la pord' de l' Templo fine li aliris;
Li dispecigis ĝin, dishakis kaj detruis,
Kaj kun alarmo en la Templon sin enŝiris...

Tumulon, bruon nenaturan ekaŭdinte,
Nebuzaradon tuj alpaŝis al altaro,
Kaj sangon sur la plank' marmora ekvidinte,
Kolere, laŭte ekkriegis la barbaro:

*) La armeestro de Babilona reĝo Nebuhadnosor,
kiu regis en la jaroj 604-561 a. Kr.

Λ Λ
Rim. de l' aŭtoro.

„Hebreoj malbenitaj! diru, kies sango
Sur la marmora planko tiel laŭte bolas?
Ĝi tre mirigas min, ĝi estas tia stranga;
Respondu tuj, mi la sekreton scii volas!”

Silentas la popolo, nur aŭdiĝas ploro,
Kaj sango sur la plank' daŭrigas la bruadon;
Sed jen maljuna pastro kun premita koro
Komencis raportadi al Nabuzaradon:

„Ho Via Ekselenc'! ĝi estas ordinara,
Ĝi estas ordinara sango de ofero:
Ŝafidon oferbuĉis ni sur la altaro,
Por ke de Dio trankviliĝu la kolero“ . . .

„Ne kredas mi!- ekkriis la tiran' avida:
Pro kio, kiel do ĝi estas tia flama!?!
Alportu tuj al mi vi sangon de ŝafido,
Kaj vidos mi, ĉu estas ĝi la sango sama?“

Rapide, senprokraste estis plenumita
Ordono lia tuj de kelkaj el amaso,
Kaj varman sangon de safido ĵus buĉita
Alportis ili en kristale pura glaso.

La glason kun la sango freŝa kaj trankvila
Atente observadis li de ĉiu flanko;
Sed ĝi—neniel estis ĝi simila
Al sang' bolanta kaj siblanta sur la planko..

Ektondris laŭte la tiran' per voĉ' sovaĝa,
Kaj en la Templo ekremegis la aero;
Per sang' pleniĝis kaj ruĝiĝis la vizaĝo,
Kaj fajron la okuloj ŝprucis pro kolero:

„Ho judoj malbenitaj! ne, vi min ne trompos!
La haŭton per pinĉiloj mi de vi forŝiros,
Mortigos ĉiujn mi kaj ĉion mi disbatos,
Se tuj al mi la puran veron vi ne diros..

Mi vidas ja: ĉi-tie estis elverŝita
Senkulpa sango de senkulpa pia homo;
Rapide diru, kiu estis mortigita,
Respondu, kia estis lia sankta nomo!?“

Silentis la popol', ĝi vorton ne eldiris,
Aŭdiĝis nur brueg' de sango, kiu bolis;
Sed al Nebuzaradon iu jen aliris
Kaj, kliniĝinte teren, larme ekparolis:

„Aŭskultu nin, ho Via Moŝto Ekselenca!
Aŭskultu nin kaj trankviligu la koleron,
Ni ĉion diros nun, venkinto plej potenca
Rakontos ni al vi la tutan puran veron...

Forlasis ni la Dion de praavoj niaj,
Ni kolerigis lin per agoj kaj paroloj,
Per agoj kaj paroloj krimaj kaj malpiaj,
Kaj al senvivaj genufleksis ni idoloj . . .

Kaj havis ni profeton sanktan, kies voĉo
Sonegis kiel fulmotondro de ĉielo,
Kaj vorto lia estis plena je riproĉo,
Kaj frapis ĝi l' orelojn, kiel per martelo...

Kaj li edifis nin, edifis kaj admonis:
Al Di', al ver', al am' li vekis nin kaj vokis,
Sed lia vok' en niaj koroj ne resonis,
Kaj lin kaj liajn vortojn ridis ni kaj mokis...

Kaj la profeton—Zharjho estis lia nomo—
Forbuĉis kaj el buŝ' elŝiris ni la langon,
De tiu temp' infero iĝis Dia domo,
Kaj trankviligi ni ne povas lian sangon“...

Li silentiĝis, ekparolis la tirano,
Kaj sur la lipoj liaj montris sin rideto:
„Mi trankviligos per senlaca mia mano
La sangon bruon, elverŝitan de profeto“!

Kaj liaj militistoj laŭ ordono lia,
La judojn alkondukis al altar' rapide,
Kaj mem iliajn kapojn unu post alia
Per sia akra glav' forhakis li avide . . .

Patrinojn kaj infanojn, kiuj ilin suĉis,
Mortigis kune li, neniun lasis viva;
Kaj ĉiujn pastrojn de la Templo li forbuĉis,
Fariĝis ĝi buĉejo vera, efektiva! . . .

Kaj sango de gepatroj, fratoj kaj de filoj
Miksiĝis kune kaj fariĝis unu maro;
Kaj naĝis tie multaj miloj kaj dekmiloj
Da homaj kapoj, forhakitaj de barbaro...


Sed sang' de la profet' daŭrigis plue brui,
Kaj pli sovaĝe, pli fortege ĝi koleras;
Ĝi muĝis, kvazaŭ ĉion volis ĝi detrui
Kaj de la planko sankta ĝi ne malaperis...

Kaj laciĝinte de l' buĉado senkompata
La mortigul' eksplodis ploron tre teruran:
„Ho Zharjho, Zharjho! Ho profeto estimata!
Ho trankviligu la bruadon sennaturan!

Mi ĉiujn pastrojn de la Templo sur altaro
Forbuĉis ja pro via nomo, ho profeto!
Ho trankviliĝu do, ho Zharjho kara,
Kaj ne rifuzu vi al mi en mia peto!“ . . .

Kaj longe li ankoraŭ surgenuie staris
Kaj la profeton larmoplene li petegis,
Ĝis kiam Di' en la ĉiel' miraklon faris:
La sango malaperis kaj silent' ekregis . . .

Volkovysk, 1914.



Enhavo.

Mia kanto	5.
Floro mia	6.
Ne envidu	7.
Songô	9.
Vintro	10.
Du Violonoj	11.
Liro	13.
Du Floroj	14.
En luna nokto	15.
Mia amatino	16.
Al . . .	17.
* * * (Al D-ro Bielenki)	18.
La Verda Standardo	19.
La Sango de Profeto	21.



Preseraroj.

Presita:

Legu:

Paĝo 12 l. 20 Kuŝas

Kuŝos


„ 14 „ 15 ĝoju

gaju

„ 16 „ 5 Vangoj pomaj, Vangoj- pomoj

Lipoj rozaj

Lipoj-rozoj



Esperanta Librotrezoro

Kolekto de legindaj, zorge elektitaj *nur originalaj* Esperantaj literaturajoj.

.....

Ĝis nun aperis:

№ 1. J. Ŝapiro (Joŝo). Babiladoj de bonhumora Zamenhofano. Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. Kun ilustraĵoj. 42 paĝoj kaj kovrilo.

. . . Ĉiu vorto en la libreto estas amuza, la ŝercoj tre spritaj, krom tio ili estas esperantaĵoj ĉiam trafaj sed neniam ofendaj. Burleskaj bildetoj plialtigas la amuzon: kun ĉiama rideto oni legos la „Babiladojn“ . . .

Marie Hankel,

raporto de E. L. A. Nov.-Dec. 1921

№ 2. M. L. Kaplan. Akordoj Esperantaj. 32 paĝoj kaj kovrilo.

Tiuj-ĉi versaĵoj aperintaj siatempe en diversaj Esperantaj gazetoj, estas kolektitaj en unu bela volumo kaj ĝojigos ĉiun poeziamanton.

Eldonejo: J. Ŝapiro Lipowa 33 Bialystok.


Reg.

601990

Magazyn 5



Książnica Podlaska
im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku



000800554

N^o 56. 25/v 1922. Druk. „Wiktoria„ Białystok, Lipowa 21.